Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo) エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Du gastoj el Eŭropo vizitis nin en majo

Sibayama Zyun'iti

1. S-ro Thierry Spanjaard el Francio

S-ro Thierry Spanjaard [tieri spanĵaar'] vizitis nin en la 7a de majo. Li, iam studinta en Japanio, vojaĝis tra Japanio de aprilo ĝis junio, kaj vizitis nin, meze de veturo de Tokio al Osako. En la Muzeo s-ro Doi prezentis pri la Muzeo, kaj mi pri NPO Esperanto-Jokohama ĝenerale, en senĝena maniero. Poste iom aferece ni respondis al lia intervjuo pri tiuj temoj — ĉar li entreprenas jutuban kanalon nomatan Esku (Esperanto-Kulturo) je <https://www.youtube.com/@EskuEsperantoKulturo/videos>. Li havas stokon da artikoloj, kaj nia intervjuo aperos espereble en la venonta septembro.

Post la intervjuo, li vizitis la klason "erikoj" gvidata de s-ino Doi Ĉieko.

(Letero de s-ro Thierry Spanjaard)

Karaj amikoj, Mi volas danki vin pro via afabla akcepto antaŭ kelkaj tagoj. Mi estis ege ĝoja renkonti vin (Sibayama), S-ron Hirokaz Doi kaj la lernantinojn. Bonvolu saluti ilin mianome.

Mi estis ege impresita de la grandega laboro, kiun vi faris kaj faras por starigi tiun belan muzeon. Via ampleksa kolekto de dokumentoj evidentigas la tutmondan ĉeeston de nia internacia lingvo. [...] Mia vojaĝo bone disvolviĝas: mi pasigis du tagojn en la tutmonda ekspozicio en Osako kaj estas nun survive al Hokkaido. Dankon denove, Plej amike.

Thierry Spanjaard, Junio 2, 2025

T. Spanjaard maldekstre, Doi Hirokaz dekstre

2. S-ro Giacomo Comincini el Italio

S-ro Giacomo Comincini [ĝakomo komincini] vizitis nin, en la 28a de majo, gvidite de nia membro Karibe Riichi. Li sola revizitis nin en la 2a de junio. Li nun studas en Japanio, kaj espereble havos ŝancon reviziti nin.

Esperanto Jokohama

■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si,
Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)
■ Redaktejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)

(Letero de s-ro Giacomo Comincini)

Karaj geamikoj, Ankoraŭ dankon pro via gastema spirito kaj pro la bonveno kiun vi donis tiel noble al mi. Kortuŝis min esti tiel ĝentile akceptita de vi kaj viziti tiel belan muzeon. Mi certe revenos al Jokohamo pro miaj universitataj engaĝoj, do mi ĝojos esti kune kun vi ankoraŭ estontece! Kaj, kiel mi diris al la amiko Riichi, mi ŝatus fari donacon al la klubo, eĉ fariĝi simbole ties membro, pro mia apreco de via laboro. Koran dankon, amike kaj civitane, Giacomo Comincini — vickonsulo pri informado de la Esperanta Civito, vicprezidanto de Itala Interlingvistika Centro, forumano por Literatura Foiro.

Niaj klasoj

***erikoj**: gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo, en merkredo, 13:30-15:30. Oni legas nefikciaĵon "Homoj manĝantaj" de Hemmi Yo, tradukitan de Doi Ĉieko. Ĝis la lasta majo, ĉirkaŭ du trionoj estis legitaj.

***Homoj**: gvidas Doi Hirokaz, ĉe la Muzeo, en sabato de 13:30-15:30. Oni legas nefikciaĵon "Homoj manĝantaj". Ĝis la majo, ĉirkaŭ tri kvaronoj estis legitaj.

***Jokohama Salono**: sen gvidanto, per reto-programo Jitsi, en sabato, 15:00-17:00. Principe la 1-an kaj la 3-an sabaton oni kune legas libron. Ĝis la lasta marto, "Sub Cirkotendo" de Stan Bubenič estis legata, sed rezignis meze pro malfacileco. De aprilo, "Ĵim' la migrulo" de Siegfried Stampa estas legata. Temas pri leoparto en Suda Afriko.

La 2-an sabaton oni interkritikas sian liberan frazfaradon, kaj la 4-an sabaton oni interkritikas sian tradukaĵon el materialo libere elektita.

***Teksanto**: gvidas Doi Ĉieko, per Jitsi, en lundo. Oni nun legas "Kredu min, Sinjorino!" de Cezaro Rossetti, sed baldaŭ oni finos. Alia libro serĉata.

***Verse**: gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo. Ĝis februaro estis legata "Viktimoj" de Julio Baghy. De marto oni legas "Vere aŭ Fantazie" de Claude Piron.

***Paŝo (eksa Elementa kurso):** gvidas Doi Ĉieko unu kursanon. En tiu ĉi jaro, uzata estas "Esperanto laŭ metodo Friis!".

eseoj

Jaĥto

Mizro Iwaya

Antaŭ mia apartamentaro etendiĝas Golfo Hirakata, kie sin ankras multaj boatoj; motorboatoj kaj velboatoj (foto dekstre). Vidante ilin, mi rememoras mian junecon kiam mi posedis malgrandan jaĥton sur la insulo Ĝoogasima. Mi ŝatas marsporton kaj iam, antaŭ ĉirkaŭ 50 jaroj, aŭdacis aĉeti jaĥton. Ĝi estis tre malgranda kun longeco de ĉirkaŭ kvar metroj. Laŭ Vikipedio mezuma longeco de jaĥto estas 10 metroj. Tial estas pli ĝuste nomi ĝin jaĥteto aŭ velboato. Tiam mi loĝis en Tokio kaj, sekve de tio, mi ofte veturis al Ĝoogasima por krozi sur ĝi. Ja



necesis du horoj por veturi de Tokio al Ĝoogasima, tial tio estis relative peza tasko por mi. Krom tio mi bezonis ekipi la boaton antaŭ ekveturo, kio necesigis al mi pli-malpli unu horon. Tial la tuta ago konsumis unu tutan tagon.

Mia kutima boata vojplano estis rondveturo ĉirkaŭ la insulo. Mi ne kuraĝis iri malproksimen al la marmezo. Eble la plej longa distanco, kiun mi projektis, estis ĝis Aburatubo, ĉirkaŭ tri kilometrojn for de Ĝoogasima. Trankvile krozi sur marsurfaco sub la suno estis plezura ludo. Aŭdiĝis nur plaŭdetoj de ondoj kun iom da ventoblovo. Mi ne aŭdis motorbruon. Mi ofte invitis miajn amikojn al la krozado kaj ankaŭ ili bone ĝuis ĝin. Iu diris al mi ke tiu ĝoje spertis kvazaŭ Robinson Crusoe surlandiĝi sur fremda bordo.

La krozado estas bona, sed la problemo estis alta prezo de ĝia tenado. Mara ankrejo ne estis havebla kaj mi luis landtenejon. Mi forgesis ĝian koston, sed konstanta elspezo ne plaĉis al mi. Tiamaniere daŭris du-tri jaroj kaj finfine mi decidis forvendi ĝin. Unu el miaj amikoj interesiĝis pri ĝi kaj aĉetis en malalta prezo. Ankaŭ ĉi tie mi forgesis la prezon. Mi sentis ke mi jam sufiĉe ĝuis ĝian plezuron kaj ne plu havas intiman ligitecon pri ĝi.

Oni ofte diskutas pri la problemo aĉeti aŭ lui. Kiu estas pli bona? Se temas pri loĝado, mi rekomendas aĉetadon, sed se temas pri iu plezurludo, kiel velboato, mi rekomendas luadon, ĉar ĝi ne daŭras longe. Nuntempe mi rememoras la procedon pri mia velboato kaj pensas ke luado estus pli bona maniero, ĉar la totala kosto estus pli malalta en tiu maniero. Ĉiukaze mi finis ĉion en ordo kaj havis sufiĉe da ĝuo. Bona rezulto.

Japanaj malnovaj presaĵoj

AKIYA Hideo

Mi vizitis la ekspozicion “1200 jaroj de japanaj presaĵoj” ĉe Urba Muzeo de Grafikaj Artoj en Machida (https://hanga-museum.jp/english), Tokio (foto 1). Pri presaĵ-artoj oni tuj rememoras japanajn *ukiyoe*-gravuraĵojn en Edo-epoko (1603-1868), kiuj estis tre popularaj inter tiamaj japanoj kaj ankaŭ influis eŭropajn belartojn. La ekspozicio, kompreneble, inkludas tiujn *ukiyoe*-artaĵojn, kaj ankaŭ modernajn presaĵ-artojn. Ili estas fame konataj kaj tre ravaj artaĵoj. Sed tio kio tre interesis min estas pli malnovaj presaĵoj en la 8-a jarcento.

1

Ili estas la sutro, *Dharani* (陀羅尼経) presita surpapere kaj enmetita en malgrandajn lignajn pagodojn (foto 2). En la jaro 764, tiama *Tennō Shōtoku* (称徳天皇) deziris funebri la mortintojn

de siatempe okazinta ribelo kaj ekvotis la tutlandan pacon. Laŭ ŝia peto, oni faris multajn malgrandajn pagodojn

2

(*hyakumantō* 百万塔, nome miliono da pagodoj) kaj multnombrajn paperfoliojn de la sutro *Dharani*. Oni volvis sutro-folion kaj enmetis ĝin en ĉiun pagodeton. La pagodetoj estis dediĉitaj al 10 oficialaj budhismaj temploj.

Laŭ Wikipedia (https://en.wikipedia.org/wiki/Hyakumantō_Darani), ankoraŭ nun kvardek kelkmil pagodetoj restas en la templo *Hōryūĵi*, Nara-gubernio, kaj kvar mil presaĵoj estas konservataj. El ili 100 presaĵoj de la sutro estas klasifikitaj kiel naciaj trezoroj. Tiuj ĉi presitaj sutroj estas taksataj kiel la plej malnovaj ekzistantaj presaĵoj en la mondo kun precizaj produktojaroj.

Ĝis la vizito mi supozadis ke tiuj sutroj estis manskribitaj, do, mi vere surpriziĝis ekscii ke ili estis presitaj. Ĉar la bezonita nombro de la sutro-volvaĵoj estis tro multa, eble mankis sufiĉaj homoj kiuj kapablas skribi literon. Tial nepre necesis la presado.

Estas du metodoj de la presada tekniko. La originala sutra teksto estas gravurita sur tabulo. Al la inkita tabulo oni premas paperon mane per ronda frotpresilo. La alia metodo estas stampado. Per ligna bloko, sur kiu estas gravurita imago de budhisma figuro, oni ripete stampis la imagon sur paperoj (foto 3).

3

sezonvorto junia

Ĉerizo さくらんぼ

Okita Kazumi



Ĉerizo estas manĝebla frukto de la okcidenta ĉerizarbo kaj estas frukto de frua somero kun multe da sukero.
Ĝi estas konsiderata kiel *kigo* (sezonvorto) de somero en hajkoj.
Onidire, ĝi efikas por malaltigi sangopremon kaj preventi arteriosklerozon.

La "*Satō-Nišiki*" el la gubernio Jamagata en nordorienta Japanio estas aparte fame konata tra la tuta lando kiel luksa frukto.